.

& Arto de vivo en paroj:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 174 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Zbigniew Galor (http://www.zbigniewgalor.pl, 2004). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

(/miimimi remi dodo; domi so fafa mimi; mimi reeremi doodo;do dodo TiSo La La;

(#Rekantaĵe: mi remi domi so fafa mi; miimimi remi dodo Ti; miimimi redo TiSo La a)

)×6)+

(& Strofoj:

'1 En la duobla mondo, ; materia – spirita, ; vivo iĝis la arto ; al paroj dediĉita.

(×:; **Nek tri, nek naŭ. Nek kvardek kaj kvar. ; Ĝuste la du – amata par'! ; Ĝuste la du – amata par'!**)

'2 Dialektika principo: ; eternaj "pro" kaj "kontraŭ", ; ĝemela la duopo. ; Unu kaj unu, ne "aŭ". .....

'3 Vivi en paro kun vi. ; Ne sole, ne en grupo. ; Ne, ne amase – des pli. ; Nur vi kaj mi sen dubo. .....

'4 Estu al mi por la par' ; kiel mankanta ŝuo, ; aŭ trovita gant'. ; Silento post la bruo. .....

'5 Ni – paroj el albumoj, ; lernej', geedzoj, gepatr'. ; Duope, sed sciantaj, ; ke ĝis tri foje la art'. .....

'6 Manko pro kruela sort': ; ŝi sen li aŭ li sen ŝi. ; Ĉiam iu en duopo kun mort'. ; Neniam sen paro restas mi. ; Nek tri, nek naŭ. Nek kvardek kaj kvar. ; Ĝuste la du – amata par'! ; Ĝuste la du – ***kaduka*** par'!)